# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



N-ro 17

# Kajeroj — el la Sudo

Fondita en 1988.

## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



Sidejo: Strato Sol, 75, E-41003-SEVILLA (Hispanio).

Prezidanto: Manuel López Hernández
Apartado 369, 41080-SEVILLA (Hispanio).

***

Sekretario: Alberto Franco Ramirez
Sol, 83/85, 41003-SEVILLA.(Hispanio)

***

Kasisto: Ramon Manau Torres
Montseny, 5.-piso, 08208-SABADELL (Barcelona) Hispanio.

---

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella
Av.Compromiso de Caspe, 27/29.9°.C.
50002-ZARAGOZA, (Hispanio)

***

Miguel Fernández Martin
C/Santa Genoveva, 58, 6°. C.
28017-MADRID.- (Hispanio)


---

Kovrilo: Rigoberta Menchu Tum, nunjara Nobel-premiito pri la paco.

---

Enhavo:


La nunjara Nobel-premiito pri la paco . . . . . . . . . . . . . 3/4/5 pĝ.
La duobla vizaĝo de la naciismoj . . . . . . . . . . . . . . . 6/7 "
La Lingvioj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8/9 "
Umberto Eco pledas por Esperanto . . . . . . . . . . . . . . 10 "
Kotiz-abon-tarifo por 1993 . . . . . . . . . . . . . . . . . 11 "
Bonvolu ridi... sed ne tro! . . . . . . . . . . . . . . . . 12/13 "
Esperanta Pop-muziko . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 14/17 "
La Sefardoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 18/19 "
Administra Angulo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 20 "
Lirikaj Paĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 21 "
La Movado en kaj ekster Iberio. . . . . . . . . . . . . . . . 22 "
Instruaj Rakontoj. Korespondi deziras . . . . . . . . . . . . 23 "


---

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aútoroj mem.

# La nunjara Nobel-premiito pri la paco



*La gvatemalia kiĉja-indianino Rigoberta Menchu Tum, 33-jara virino, estas la nunjara Nobel-premiito pri la paco. Oni premiis ŝin kiel agnoskon de ŝiaj streboj por la socia justo, ŝia batalo por la paco intergenta en la propra lando kaj ŝia konstanta defendo de la homaj rajtoj de la indiĝenoj de Ameriko.*

*Ŝi gvidis la Komitaton por la Unueco de la Kamparanoj de Gvatemalio kaj ĉiam celis porpacajn principojn kaj etna-kulturajn valorojn en medio, kie regas violento kaj maljusto.*

*Rigoberta Menchu estas okulfrapa ekzemplo pri suferado en propra karno de tiom da kruelo kaj perforto vivitaj: ŝi sentis la doloron de tia perverso en la sino de sia intima familio, ĉar ŝia patro mortis bruligita en la hispana ambasado en 1980, kiam la gvatemaliaj policistoj volis aresti la kamparanojn tie sin riguĝintajn kaj bruligis kaj sturmis la diplomatan reprezentejon; tri monatojn poste ŝia patrino suferis seksperforton kaj morton, kaj iom pli malfrue unu el ŝiaj fratoj estis mortpafita de sovaĝaj militistoj. Ŝi mem devis forkuri por savi sian vivon, serĉis rifuĝon en monaĥejo kaj poste ekziliĝis en Meksikion, kie ŝi nun loĝas, aktive partoprenante en homamaj taskoj de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UNO.*

*Tiu ĉi brava virino, la kiĉja-indiana* Rigoberta, estas nun viva simbolo de paco, ĉar, malgraŭ tiom da teruraj spertoj travivitaj, ŝi senhalte strebadas por la paco de tiu mizera kaj tamen riĉenhava regiono, kaj por homamaj valoroj de la amerikaj indiĝenoj.*

*Mi volas kredi, ke la norvega Komitato*

pri Nobelpremioj laûreatigis tiun ĉi eminentan virinon okaze de la datreveno de la Amerikmalkovro, kiel agnoskon universalan de tiuj civilizacioj kaj homoj indiĝenaj loĝantaj en tiu kontinento, kiujn ni, eûropanoj, malestimis kaj plejofte sklavigis laûlonge de kvin jarcentoj. Aljuĝi tian premion al virino, kiu simbolas tiujn indiĝenojn estas kio ĝuste decas. Mi opinias erara la sinteno de tiuj radikaluloj kontraû la celebrado de tiu datreveno. La vera kerno de la afero estas tio, kiajn homajn valorojn oni devas ekzalti kaj kiajn farojn el tiuj,oni devas abomeni, ĉar evidentas, ke la silento nur helpas kaŝi la honton de la krimo kaj baras la bezonon de la "civilizita" mondo pri justa informado. La protestoj devas daûri, sed ne pro tiu celebrado pri du mondoj, kiuj antaû kvin jarcentoj renkontiĝis, sed kontraû la persisto de maljusto, kontraû la marionetoj novimperiismaj venantaj el la nordo de tiu kontinento mem, suĉanta la sangon kaj ŝviton de tiuj popoloj, kontraû tiuj hontigaj filmoj, kiuj ekzaltas la ekstermadon de indianoj pace loĝantaj en la propraj hejmoj, ktp. ktp.



La vera signifo de la elekto de Rigoberta Menchu kiel nunjara Nobelpremiito pri la paco estas tia, ĉar ne plu prokrasteblas la proklamo de la aûtentaj valoroj de la tiel nomita Nova Mondo, kaj la gravaj eraroj de la eûropanoj konsideri la indiĝenajn popolojn de Ameriko barbaraj kaj sovaĝaj. Oni tiel restarigas la respekton al la indiĝenaj kulturoj, kiujn ni neniam komprenis kaj nur valorigis kiel muzeobjektojn. La defendo de tiuj rajtoj legitimitaj estas tio, kion de nun simbolas la ĉi-jara Nobelpremio pri la paco.

Ĉu eble ankoraû iu el tiuj "kleraj" homoj kuraĝos dubi pri la nesovaĝeco de la amerikaj indiĝenoj leginte la verkon de Rigoberta "Mia nomo estas Rigoberta Menchu, kaj tiel naskiĝis mia konscio" aû tiuj dubemuloj preferas legi jenajn versojn de Rigoberta, originale verkitajn en la hispana lingvo, kiujn mi tradukis al la esperanta kun la sola celo, ke niaj legantoj konstatos la lirikan spiriton de tiu brava indiĝeno?:

## *MI PRETERPASIS LA LIMON*

*Preterpasis mi la limon,*
*mi ne scias pri reveno,*
*eble tio ja okazos,*
*kiam venos la printempo.*

*Mi revenos iun tagon,*
*eble dum la frumateno,*
*kiam la avino luno*
*kaj la patro sun' en festo*
*akompane de l' jubilo*
*kaj la hel' de ĉiuj steloj*
*diros al ni plej kontentaj*
*kun la ĝoj' de la festenoj,*
*ke tuj post la pluvofino*
*ĉiuj plantoj vive kreskos.*

*Reburĝonos la ajotoj(**),*
*kiuj baldaŭ malaperos*
*kvazaŭ militistoj murdus*
*la florŝosojn dum vespero.*

*Floros l' abrikotarbaro*
*sur la kampoj kaj la bedoj:*
*por la filoj niaj karaj*
*multe da maiz' ni semos,*
*kaj revenos l' abelaroj*
*forkurintaj pro timego...*

*Preterpasis mi la limon*
*kun sufer' kaj trista sento!*

*Per la figuro de Rigoberta Menchu Tum, la tuta mondo konas de nun tiujn indianojn, kiujn la filmoj prezentis kiel sovaĝulojn, kaj stariĝas pli aŭtenta bildo pri la homaj valoroj de la amerikaj indiĝenoj. Trafe UNO deklaris ĉi tiun jaron: "OMAĜO-JARO POR INDIĜENOJ".*

*Antonio Marco Botella*

(*) Kiĉjo: Etna grupo indiana de la lingva familio majao, parolata de pluraj indianaj triboj.
(**) Ajoto: En Centra-Ameriko kukurba planto donanta manĝeblajn fruktojn.

# La duobla vizaĝo de la naciismoj

Galopas sur la Balkanaj teroj apokalipsaj rajdantoj disvastigante malavare malamon, teroron kaj morton.

Sinjorecas senhonte, kun sia aspekto plej terura kaj sinistra sur la mondoscenejo, la rezulto de novaj naciismoj: fanatikismo, perforto kaj murdado... Pasive, la tiel nomata civilizita mondo rigardas la masakron! Oni ne devas silenti. Oni ne povas ignori kion niaj okuloj vidas.

Ne unuafoje ni proklamis sur la paĝoj de tiu ĉi revuo la karakteron de la naciismoj kaj, skrupule respektante la opinion de bonintencaj naciistoj, ni devas insisti plian fojon pri aspektoj de tiu idearo tute ne akcepteblaj de progresemaj homoj. Tiusence ni devas substreki la duoblan vizaĝon de la naciismoj: de unu flanko ni diru, ke temas pri doktrino kun mistika bazo, laŭ kiu certaj distingaj trajtoj, kiel komunaj lingvo, kulturo, tradicioj k.a., profilas ian identecon. Kiam tiuj elementoj estas jarcentaj naturaj produktoj de la propra historio, ŝajnas tute kompreneble, ke tiuj kolektivoj celu nepran agnoskon de tiaj konkretaj valoroj, kaj aspiru al kunvivado laŭ propra stilo kaj preferoj.



La alia vizaĝo de sama doktrino estas tiu, kiun ĝi montras, kiam ĝi radikaliĝas kaj envolviĝas en mistikismajn politikajn celojn, konsiderante la proprajn ambiciojn, ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia. En tiu ĉi kazo, perforto kaj murdado ŝajnas uzindaj elementoj por tiaj aspiroj. Jen do en unu sola doktrino du vizaĝoj malsamaj: la unua, prava, se oni aspiras al libera malvolviĝo de la propraj kolektiva personeco, lingvouzo, kulturo kaj kutimoj;la dua, evidente perversa, se por atingi certajn politikajn parcelojn, oni perdas eĉ la respekton pri minimumaj homaj rajtoj. La kontraŭdiroj de tiu duobla vizaĝo montriĝas plej sovaĝe, kiam oni vidas tiujn blindajn naciismojn ĉe Balkanoj senkompate ekstermi aliajn naciismojn malpli fortajn, viktimojn de la propra voremo de tiu rezono de la senrezono; ja ĉiu el ili kredas sin pli prava ol la ceteraj, ja karakterize ĉe la agresemaj naciismoj... Kien ni metu la limon inter paca kaj violenta naciismoj?

Verdire, la dramo de la naciisma kaŭzo kuŝas en la fakto, ke certaj popoloj ne konkeris sian rajton esti nacio dum la tempo, kiam naskiĝis nacioj. Kiel deklaris la eminenta intelektulo Umberto Eco antaŭ kel-

kaj tagoj, la politika identeco ne ĉiam same montriĝas je sufiĉa nivelo por atingi sendependecon. Nun, post pluraj jarcentoj, la vojo irenda al la progresema mondo sub vidpunkto socia, politika kaj histori-evolua ne plu estas la nacio, sed la memregado de la popolo ene de politika strukturo pli moderna, sen la feraj baroj de arkaika sistemo ideologie baziĝanta sur la raso, moroj kaj kredoj. Vere, ne ekzistas futuro por tiu reakcia idearo, ĉar temas pri ideoj esence kaŝantaj grandajn dozojn da fanatikismo kaj regresemaj antaŭjuĝoj. Jen kial la plej progresemaj popoloj en la mondo jam programas sian futuron surbaze de strukturoj politikaj kaj teritoriaj, en kiuj grandparte malaperos baroj interhomaj: landlimoj, suverenecoj, rasdiferencoj, patriotismoj, k.a.

Ĉe tia perspektivo ne sencus, ke ĉiu etna grupo, ĉiu tribo aŭ minoritato lingva aŭ kultura, pretendus starigi propran ŝtaton kun la harhirtiga ŝargo de ksenofobio kaj rivalecoj internajbaraj, ĝuste kiam la sistemo estas jam kaduka, nevalida. Ĉiujn fortojn ni devas nun uzi por novaj celoj: konkero far ĉiu popolo de memregado, respekto absoluta al la homaj rajtoj de la individuoj, kreado de novaj principoj sociaj kaj organizado de pli aktualaj kolektivoj laboristaj, kiuj ebligu nin kontraŭbatali la multnaciajn kapitalismajn entreprenojn kaj sukcese atingi niajn sociajn aspirojn. Tio jam je nivelo kontinenta.

Kaj certu, ke ni ne parolas pri utopioj, ĉar ni jam eksurvojas: necesas, eĉ urĝas, ke ni, la popoloj de la Eŭropa Komunumo, faru jam firmajn paŝojn antaŭen por la unuiĝo de Eŭropo ĉiurilate kaj ne plu nur komerce. Bremsas la *naciismaj* antaŭjuĝoj la progreson kaj kreadon de tiu moderna Eŭropo, kiu devas esti ekzemplo kaj stimulo por aliaj malriĉaj popoloj de aliaj kontinentoj.

Ni, laboristoj kaj eŭropanoj, ne devas lasi nin trompi de tiuj ĵonglistoj de la politiko serĉantaj ĉiam la propran profiton, ĉar ili prezentas al ni senalternative la Eŭropon de la nacioj, ekvivalenton de la Eŭropo de la negocistoj. Se io pozitiva alportis ĝis nun en Eŭropon la traktato de Maastricht, tio estas la grava historia debato pri la futuro de la eŭropaj popoloj, kiu vekis renovigajn aspirojn kaj esperojn pri nia destino kiel homoj. En Eŭropo jam batis la horo de vera modernigo: de la ideoj, de la regionoj, de la popoloj. La naciismoj, en la mano de dekstruloj kaj kapitalistoj, baros ĉiam nian vojon en tiu Eŭropo, kiu nun naskiĝas.

Nia tasko estas nek facila nek tuja, sed nepre farendas. Ja, laŭ aserto de certa eminenta politikisto, "veran demokration oni konkeras ĉiutage". Simile, ankaŭ ni devos konkeri ĉiutage la Eŭropon de la popoloj!

Goethe, pli frue ol tiu politikisto, prave sentencis: "Nur tiu, kiu konkeras ĉiutage sian liberecon, meritas ĝui ĝin".

*Antonio Marco Botella*

# LA LINGVIOJ

Ne estis surprizo por ni legi en "Sennaciulo" (Oktobro-1992), ke, dum la SAT-kongreso en Kaŭno, oni debatis denove la problemon pri fondo de Laboristaj Esperantistaj Asocioj (LEA-oj), en tiu ĉi kazo en Orient-Eŭropaj landoj, kaj kian struktur-sistemon uzi en la fondotaj organizaĵoj.

Laŭ la Gotemburga Konvencio, LEA-oj devus organiziĝi ne laŭ ŝtatoj sed laŭ lingvioj. Ni ne volas polemiki nun, ĉu tiu sistemo, decidita siatempe, taŭgis por la funkcio, por kiu ĝi kreiĝis. Tiuj estis aliaj tempoj, kaj malsamaj la bezonoj. Ĉiukaze temas jam pri pasinto kaj ne tro utilus por nia Asocio konkludi, ĉu oni eraris tiam aŭ ne. Tio, kion ni povas certigi nun sen ia ajn dubo, estas, ke oni ne aplikis la regulon pri fondo de LEA-oj, kiun postulas la Gotemburga Konvencio, kaj tial oni povas konsideri absurda, ke la SAT-P.K. insistas nun, ke oni fondu novajn LEA-ojn per tiu strukturo nepragmata nomata lingvio, ne akceptita en sia strikta apliko de la nun funkciantaj laboristaj asocioj.

La ĥaoso reganta en la SAT-Esperantio pri tiu afero estas absoluta. Ke neniu k-do volu vidi en tiu ĉi denunco strangan celon ni ja nur deziras, reguligi la situacion aktualan de la ekzistantaj asocioj, kaj eviti la eblan eraron meti la organizontojn de novaj LEA-oj en la teruran dilemon pri akcepto aŭ neakcepto en ili de lingvaj minoritatoj, en Centraj kaj Orient-Eŭropaj landoj tiel abundaj. Ni devas doti niajn laboristajn asociojn per flekseblaj elementoj, kiuj faciligu iliajn konsiston kaj disvolvon, kaj neniel bari nian futuron per burokrataj dogmemaj postuloj.

La situacio de la nun funkciantaj LEA-oj jenas: ekzistas du germanlingvaj LEA-oj (en Germanio kaj en Aŭstrio); en la nederlanda lingvio nur unu sola membro ekzistas en belga teritorio; dana LEA-o malaperis; SAT-Amikaro, teorie enhavanta la franclingvanojn, akceptis en siaj vicoj katalunajn kaj vaskajn parolantojn de la francaj teritorioj; la jugoslava nacia UEA-organizaĵo estis nekredeble akceptita kiel LEA-o, tiamaniere, ke ĝi reprezentas samtempe burĝojn kaj laboristojn, do temas ne pri kunlaboro de ambaŭ, sed pri efektiva reprezento; en Hispanio oni parolas oficiale kvar lingvojn kaj ekzistas unu sola LEA-o por la tuta hispana teritorio, ja la provo de la P.K. pri starigo de kataluna lingvio per naciistoj brue fiaskis, kaj eventuala lingvio per sudamerikanoj kaj hispanoj fariĝis neplenumebla pro la longaj distancoj inter ambaŭ kontinentoj; la angla lingvio devus konsisti el angloj kaj nordamerikanoj, minimume, sed nur el britoj konsistas la ekzistanta LEA-o...

Ĉu oni povas kolekti pli da diverseco kaj konfuzo? Kial, rigardante tiun panoramon, SAT insistas apliki la Gotemburgan Konvencion anstataŭ reguligi la situacion de ĉiuj kaj pretigi unikan projekton konsente por venontaj LEA-oj?

Aldone al tio, oni esprimis dum la debato pri lingvio en la citita kongreso kuriozajn opiniojn pretendante difini konceptojn pri la SAT-movado, tiel maltrafajn kaj tiom da lumjaroj distajn de la realo, ke plaĉe ni legus korektojn de la koncernaj responsuloj por iomete aranĝi la aferon; ekz. la reprezentanto de SAT en la debato asertis, ke "ĉar SAT ne havas landajn asociojn kiel UEA, pro tio ĝi estas Sennacieca Asocio Tutmonda". Evidente, la frazo terure lamas, kaj la postaj konsideroj, kiujn li atribuas al k-do Lanti pri ŝtatoj kaj nacioj, tute ne aranĝas la misdifinon.

La SAT-eco de la membroj de nia asocio, same kiel ĝia movado, neniom rilatas al la nacio, kie ili loĝas aŭ naskiĝis. Administra strukturo apenaŭ povus indiki certan tendencon, sed neniam doni sencon ideologian al asocio. La SAT-eco de la individuoj, en tiu ĉi kazo, estas en intima rilato kun la idearo, kiun ĉiu el ni havas, kaj kun la filozofio, kiun ni akceptas. Mia penso ne ŝanĝiĝis kiam mi vivis en Afriko, Francio aŭ Hispanio. Kaj se morgaŭ oni ŝanĝus la strukturon de nia asocio, mi restus sama SAT-ano ol antaŭhieraŭ. Estas la strukturo de la organizaĵoj, kiu devas adaptiĝi al la bezonoj kaj celoj de la individuoj aŭ kolektivoj. Pro tio, kiam ni parolas pri niaj lingvioj, ni ne povas atribui al ili virtojn ne ekzistantajn. Temas pri administra strukturo, kaj punkto. Se taŭga, oni ĝin uzas; se male, oni ĝin forĵetas. En tiu ĉi kazo evidentas, ke la lingvioj (kun novkoloniismaj spuroj neniel koheraj kun la SAT-idearo) estis/estas tute neutilaj, do gravas, ke oni restudu la Gotemburgan Konvencion, kaj, se necese, ni ŝanĝu, konfirmu aŭ forĵetu ĝin, sed oni ne povas lasi tiun aferon putri, same kiel jam okazis antaŭ kelkaj jaroj.

Laŭ nia opinio, kaj tial ne nepre farenda, SAT devus submeti al la atenta studo de la anaro -kaj, se eble, antaŭ ol oni fondos novajn LEA-ojn- jenajn konsiderojn:

a) Publikigi en "Sennaciulo" aŭ per cirkulero la tekston de la Gotemburga Konvencio, por ke la membroj studu kaj opiniu pri ĝia aktuala taŭgeco.

b) Krei specialan Komisionon por aktualigi aŭ sugesti novan Konvencion por LEA-oj. Pretigo de kompleta projekto.

c) Peti al la prezidantoj de la nun funkciantaj LEA-oj opinion pri la Gotemburga Konvencio kaj pri dezirindaj eventualaj aldonoj.

Ni petas niajn k-dojn de la P.K. akcepti la enhavon de tiu ĉi artikolo ne kiel kritikon al ilia agado (ja ili ne kreis la Konvencion), sed kiel modestan kontribuon al la modernigo de SAT.

*La Redakcio*

P.S.
KAJEROJ permesas eventualan reprodukton de ĉi tiu artikolo en "Sennaciulo" aŭ periodaĵoj de niaj LEA-oj, kompreneble se la koncernaj ĉefredaktoroj konsideras tion interesa por ties legantoj.

---



# UMBERTO ECO PLEDAS POR ESPERANTO

Umberto Eco, katedra profesoro pri Filozofio ĉe Bologna Universitato, prestiĝa semiologo kaj aŭtoro de gravaj verkoj, i.a. "La nomo de la rozo" kaj "La pendolo de Foucault", veturis pasintdecembre al Galegio (*) kaj en A Coruña partoprenis en la 5-a Internacia Kongreso pri Semiotiko, kaj en ĝi esprimis sian opinion, ke Esperanto estu instruata en fruaj aĝoj, tiel, ke ĝi iĝu vehikla lingvo en Eŭropo. Li insistis, ke tio ne implicas forgesadon de la lingvoj ekzistantaj en la mondo, kaj petis politikan apogon por la internacia lingvo.

La plej gravaj ĵurnaloj en Hispanio disvastigis la opinion de la itala intelektulo pri Esperanto, kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, samideano Antonio Alonso Nũñez, loĝanta en Galegio mem, intervjuis lin persone. Eco ratifikis pli detale ĉion, kion li deklaris pri la dezirinda uzo de Esperanto kiel vehikla lingvo, kaj agnoskis la valorojn de nia internacia lingvo. Li rakontis al la prezidanto de la hispanaj esperantistoj, ke en siaj oftaj vojaĝoj, ĉefe en Francio kaj Germanio, li konstante aŭdas plendojn, ke la angla lingvo jam preterpasis la rolon de vehikla lingvo kaj iĝis imperiisma danĝero al la naciaj lingvoj, kiuj ekperdas terenon antaŭ ĝi. Kaj prof. Eco ĉiam replikas al ili per sama simpla konsilo: "Ekinstruu Esperanton al viaj geinfanoj, kaj la danĝero malaperos"!

Ankaŭ "El Pais", la plej prestiĝa ĵurnalo en Hispanio, intervjuis la faman italan verkiston kaj semiologon pri la Eŭropo de la Traktato de Maastricht, la nacia identeco, la lingvoj kaj signifo de la urboj en Eŭropo.

Eco opinias, ke la nacia identeco ne estas produkto de la informado aŭ de la gazetaro, sed produkto de la historio. Rilate al la temo pri lingvoj en Eŭropo, li konfirmis sian opinion pri la absoluta bezono de vehikla lingvo, t.e. de lingvo, kiu, kiel la latina dum la mezepoko, taŭgu por ĝeneralaj rilatoj kaj por interkompreniĝo de la Eŭropaj popoloj. Tiu vehikla lingvo povus esti natura, kiel la angla, aŭ artefarita kiel Esperanto, kaj tuj li aldonis por ŝirmi la respekton al minoritataj lingvoj, "ke vehikla lingvo montris neniam inklinon fariĝi natura lingvo, kaj la historio jam pruvis, ke estas tre malfacila trudi vehiklan lingvon al la popoloj".

La vortoj de profesoro Umberto Eco, kvankam ili nur esprimis argumentojn similajn al tiuj ĉiutage ripetataj de la esperantistoj, multe impresis la publikan opinion.

Jam de longe, pledo por Esperanto ne trovis tiom grandan atenton!


*La Redakcio*

## KOTIZ-ABON-TARIFO POR 1993

| | |
|---|---|
| Baza SAT-Kotizo | 3.000,-ptoj |
| Emerita SAT-kotizo | 2.250,-ptoj |
| Jara abono nur "Sennaciulo" | 1.600,-ptoj |
| Membreco HALE (por SAT-anoj) | 500,-ptoj |
| Abono "Sennacieca Revuo" | 450,-ptoj |
| Abono "Kajeroj el la Sudo" | 800,-ptoj |
| " " " " " por eksterlando | (gm) 15,- |
| " " " " " " " | (gld) 16,- |
| " " " " " " " | (ff) 50,- |

Bonvolu sendi viajn pagojn al nia k-do Ramón Manau Torres; C/Montseny, 5. Piso. E-08208 SABADELL (Barcelona), al la konto Caixa de Pensions. Oficina 461. Lta. 171-29. SABADELL. (Barcelona).

# Bonvolu ridi



# Sed ne tro!

Sincereco antaŭ ĉio.

Du geamantoj ĝuas surlite ĉe ŝi momentojn de volupto, kiam tintas la telefono. La viro demandas al ŝi:
-Kiu telefonas vin?
-Nu, mia edzo- ŝi tuj respondas.
-Kaj kion li diras?
-Ho, simplan bagatelon! Li diras, ke ĉi-momente li estas kun vi kaj via edzino ĉe via kampardomo.

***

Ŝuisto diris iam al tajloro:
-Ĉu vi scias, kial grincas la ŝuoj de tiu sinjoro?
-Kial?
-Ĉar li ankoraŭ ne pagis la ŝuojn al mi.
-Tio estus konvinka pruvo, se grincus ankaŭ lia pantalono, ĉar ĝi ankoraŭ restas nepagita!

***

En la juĝejo.
La juĝisto: -Kaj kial vi batis la denuncinton?
-Ĉar li estas malsaĝulo!
-Sed, ĉu malsaĝulo ne estas persono, kiel vi aŭ mi?

***

Inter geedzoj.
La edzino: -La jurnalo diras, ke edzo donacis al sia edzino perlan kolieron, kiu kostas 100.000 dolarojn. Tio neniam okazis al mi!
La edzo: -La jurnalo diras ankaŭ, ke edzo mortigis sian edzinon, kaj tio neniam okazis al vi.

***

Pedantulo diras en amika rondo:
-Mi estas kiel Sokrato: mi nur scias, ke mi scias nenion.
-Nu -respondas al li ĉeestanto-, sed malfeliĉe por vi ankaŭ tion ĉiuj scias.

*K-doj: NI ATENTIGAS VIN PRI LA PAGO DE ABONOJ KAJ KOTIZOJ!*

Komprenebla dubo.

La trajno haltas subite kun terura bremso-grincado. Junulo malgajmiena eligas sian kapon tra vagonfenestro kaj demandas:
-Kio okazas? Ĉu akcidento?
-Ne, iu funkciigis la alarmbremsojn, kaj pro la subita ekhalto la lasta vagono elreliĝis. Ni restos ĉi tie pro tiu motivo almenaŭ du horojn.
-Kia domaĝo! Kaj mi, kiu devas edziĝi ĉi tiun posttagmezon mem!

Aŭdinte tion, la maŝinisto turniĝas rapide al la junulo:
-Nu! -li demandas al juna homo suspekteme-, ĉu ne estas vi mem kiu funkciigis la bremsojn?

***

Ĉu serioze aŭ ŝerce?

Mikaelo vangofrapas Ludovikon brue sovaĝe. Tiu ĉi lasta kolere diras al la alia:
-Ĉu vi faris tion serioze aŭ ŝerce?
-Ho, mi tion faris tre serioze!
-Ha, bone! ĉar mi ne kutimas toleri tiaspecajn ŝercojn!

***

Saĝa respondo.

Sur strato de malgranda urbo oni kondukas ĉerkon, post kiu iras multnombra sekvantaro.

Preteriranto eksentanta scivolemon demandas al iu el la sekvantaro:
-Sinjoro, mi vin petas, kiu estas la mortinto?

La demandito respondas tre serioze:
-Tiu, kiu estas en la ĉerko!

***

Ĉu kohera respondo?

Post longa drinkado ebria homo eliras el taverno tiel malfirma kaj ŝanceliĝanta, ke li apenaŭ povas sin teni stare. En tiu stato li faletas preskaŭ ĉiupaŝe, ĝis li restas side sur la trotuaro.

Hazarde pasas apud li preteriranto, kaj la drinkulo demandas lin duonsvene:
-Diru min, sinjoro, ĉu estas tage aŭ nokte?
-Mi ne povas sciigi vin pri tio, ĉar mi estas fremdulo loĝanta ĉi tie nur kelkajn tagojn.

*** Mª Fernanda.

# ESPERANTA POP-MUZIKO




## KUN "SOLO" EN KUNESTO

La muzikan ensemblon **Solo** konsistigas unuopulo: Eduardo Vargas. Eduardo, juna hispano (andaluzo de Malago) plurfacete muzikistas. Li komponas la muzikon kaj la esperantajn tekstojn de siaj kanzonoj, kantas, ĥoras kunmetante diversajn registrojn de sia propra voĉo per elktronika muntaĵo, akompanas sin per klavaro...

Eduardo publikigis ĝis nun du laborojn: la diskon *Kosmo-Infano* kaj la sonbendon *Ili estas nur kanzonoj*.

Ĉi-jare li turneis tra la franca Esperantujo. Sukcese. Kaj same koncertis kadre de la HEF-kongreso en Merido. Ni ĉeestis la koncerton kaj, persone konatiĝinte kun li, kun lia muziko, kun lia ludmaniero, rigardis interesa por la legantoj de *KAJEROJ* ian alproksimigon al liaj kreaj universo kaj ŝlosiloj. Tian ni poste klopodis realigi per la jena intervjuo:

**Kajeroj**: *Eduardo, kial muziki en esperanto?*

**Solo**: Bone, mi estas muzikisto jam dek kvin jaroj. Antaŭe mi provis kanti hispane kaj iom angle, sed mi ne sukcesis. Sendube mi intuis-supozis, ke devas ekzisti stranga mikslingvo, ĉar mi ĉiam zomkantis en ia slango, kiun oni povus nomi "angla montarana". Tiu estis nek vere angla, nek hispana, nek latina. Temis, simple, pri sonlingvo, eble iel simila al la sanskrito, kaj ĝi servis al mi por komponi tekstojn, kiujn poste mi tradukis hispanen. Konatiĝinte kun e-o, mi konstatis tuj, ke ĝi tre riĉas je muzikaj nuancoj, kaj komencis tuj komponi sen problemoj -almenaŭ laŭ la strikte muzika vidpunkto-. Kompreneble, e-o estas bona por transkribi ĉiajn ideojn, Spirite e-o retroportas min al la antikva epoko, kiam niaj popoloj, antaŭ la Babeltura fenomeno, parolis ununuran lingvon: la sanskriton. Tiun belan ideon pri

ununura lingvo oni povas disvastigi tra la tuta mondo pere de la muziko. Materie, per e-o mi povas diskonigi mian muzikon kaj kontakti plej diversajn personojn lokojn kaj kulturojn en la mondo. Ja, laŭ popoldiro en E-ujo, "Esperanto ne konas landlimojn".

**Kajeroj**: *Bonvolu, skizi la nunan muzikan panoramon en E-ujo.*

**Solo**: Mi pensas, ke nuntempe estas bona la apero en E-ujo de multaj muzikistoj, ĉar tio servas por konsciigi al la homaro la fakton, ke per e-o oni povas esprimi ĉiajn ideojn. Tamen, miaopinie, troas la nombro da ensembloj, kiuj rokas kaj folkas. Ambaŭ stiloj estas tro kutimaj kaj konataj, tro eluzitaj por muziki plue per ili. Krome, tio povas kaj bari la aperon de novaj kolegoj, kiuj ŝatas muziki alie, kaj kutimigi la orelojn de niaj muzik-amantoj al nur tiuj du stiloj. Mi pensas, ke jam estas la momento iniciati novan eraon en E-ujo, donante al la lingvo ĉiajn novajn muzikeblecojn. Sed, ĉiukaze, mi respektas ĉiajn e-ensemblojn.

**Kajeroj**: *Ĉi-kuntekste, kian pozicion okupas Solo kaj kion novan alportas la propono de Solo al la e-a gejunula muziko?*

**Solo**: Kiel mi diris antaŭe, oftas en E-ujo aŭskulti nur rokon kaj folkon, dum la movado ne konas originalajn stilojn. Pro tio *Solo* intencas doni al la movado alian alternativon per mikso de stiloj, uzante etnajn melodiojn,klasikajn nuancojn...
surbaze de pop-strukturo. Rilate al la tekstoj, se paroli sincere, *Solo* ne povas abkoraŭ alte flugi. Kompreneble. Mi esperantistas de antaŭ nur tri jaroj. Sed almenaŭ ankaŭ mi alportas ion novan, mi montras, ke oni povas kanti verkojn ankaŭ forgesante la kutimajn regulojn, rimon, ktp. Tute certe *Solo* ne estas poeto. *Solo* kantas pri la problemoj de la mondo kaj la vivo uzante kiel pretekston antikvajn filozofiojn el niaj historioj, nian spiritan evoluon, la fantazion... Kaj mi kritikas, evidente, la militon, la malsaton, ktp. Tute certe, ke venadas al ni nova kosma erao. Pro tio *Solo* per siaj tekstoj klopodas memorigi la aŭdantarojn pri tio, ke interne de ni troviĝas riĉa mikrokosmo, plena de vivo, kiu dependas de kaj similas al la makrokosmo nin ĉiujn ĉirkaŭanta.

**Kajeroj**: *Vi ĵus asertis la jenon: "Solo ne estas poeto". Nu, ĉu vi neniam pensis pri la eblo muzikigi poemojn el niaj originalaj klasikaj aŭ modernaj bardoj?*

**Solo**: Jes! ĵus mi komencis labori super poemoj de Miguel Fernández. Kaj nun mi atendas tekstojn de Gonçalo Neves kaj Georgo Kamaĉo, kiuj proponis al mi, ke mi provu muzikigi ilin. Min tre plezurigus muzikigi

ankaŭ ion el s-ano William Auld, sed mi ne scias, ĉu li volos kunlabori kun tiu ĉi frenezuleto, nomata *Solo*, kvankam, mi scias, li ŝatas mian muzikon.

**Kajeroj**: *Kiel vi difinus vian muzikon plej koncize?*

**Solo**: Mi ne ŝatas difini mian muzikon. Tion devas decidi miaj, ni diru, adeptoj kaj diversaj aŭdantaroj. Ĉi-sence, multaj s-anoj opinias mian stilon "etna elektronika popo devenanta el mistera kosmo". Eble ili pravas, ĉu ne?

**Kajeroj**: *Viaj du registritaj laboroj elmontras plurajn komunajn trajtojn, kiuj profilas vian personan stilon. El ili ĉiuj plej altiris nian atenton via emo al arabaj harmonio kaj tonaloj. Parolu al ni pri tia emo aŭ amo?*

**Solo**: Jes! Mi havas multajn influojn el islamaj melodioj, eble ĉar mia loĝurbo situas relative proksime de Nord-Afriko. Jes! Mi deziras omaĝi al la islama kulturo. Miaj kanzonoj "Ibrahim", "Nova Erao" kaj "Tamarinda" enhavas nuancojn ankaŭ de kantoj de la fenicoj, kiuj evidente, kune kun aliaj popoloj, estis la patroj de la islamanoj. Kadre de mia turneo, mi spertis bonan aferon, kiam mi koncertis en Limoges (Francio). Tie ĉeestis multaj irananoj, kiuj manplaŭdis kaj dancis laŭ la taktoj de tiuj kanzonoj. Sed, fu!, poste mi eraris, dirante al ili, ke mi lasis min influi de arabaj melodioj, ĉar ili obĵetis, ke ne. Ke tute ne! Ke Arabio estas nur moderna nacio baldaŭ malaperonta. Ke mi havas influojn el la antikvaj islamaj muziko kaj kulturo. Ŭaŭ! Nur poste mi sciis, ke tiuj homoj estas malproksimaj parencoj de s-ro Gadaffi. Pro ĉio ĉi mi diras nun, ke mi ricevas influojn el la *islama kulturo*, kaj neniam mi havos problemojn kun iu ajn.

**Kajeroj**: *Ĉu ne ekscitas vian intereson alietnaj muzikaj skemoj?*

**Solo**: Jes! Tre plaĉas al mi ankaŭ aliaj etnaj nuancoj. Fakte, en miaj kanzonoj spureblas pluraj karakterizoj el diversaj etnaj kulturoj, ĉar mi pensas, ke ĉiaj vivo-formoj devenas el sama komenco.

**Kajeroj**: *Dum via ludado en Merido, kadre de la 52-a HEF-kongreso, estiĝis la ĝenerala opinio, ke viaj laboroj gajnas el rekta kontakto kun la publiko. Kion signifas al vi troviĝi vid-al-vide de spektantaro? Kiel tiu influas vin?*

**Solo**: Ha! Estis strange. Komence mi pensis, ke mia koncerto ne plaĉas al la spektantaro de Merido, sed poste mi vidis, ke ili ŝatas kaj apogas mian muzikon. Ili almenaŭ ne foriris el la salono kaj fine forte aplaŭdis min. Kompreneble, tio estas bona por la artistoj, kaj mi dankas al HEF kaj, precipe, al ties prezidanto s-ro Alonso, ĉar li prezentis min kiel la unuunuran muzikiston de Hispanio, kiu eldonas profesie en e-o -almenaŭ mi ne konas

aliajn, bedaŭrinde-. Estis interesa por mi ĉeesti la koncerton de Miguel Fernández kun la ĥoro "Verda Stelo", kiuj montris al ni tre altnivelan lirikan-muzikan spektaklon en e-o. Kaj mi pensas, ke ili devas eldoni tian muziklaboron por disvastigi ĝin, ĉu ne?

**Kajeroj**: *Projektoj, planoj, novaj kanzonoj, koncertoj... Raportu al ni pri via tuja futuro.*



**Solo**: Pri miaj projektoj mi diru, ke, unue, mi devas fini la vendon de mia unua disko, *Kosmo-Infano*. Poste mi pretigos grandan eldonon de mia dua laboro en e-o, *Ili estas nur kanzonoj*. Aliflanke, apenaŭ mi finis mian turneon en Francio, s-ano Floreal Martorell, reprezentanto de Eurokka kaj de Rokgazet', la unua profesia revuo pri e-a muziko, sciigis min pri sia intenco prezenti min en la Arta Kunveno de Parizo kaj en la Muzika Festivalo de Kolonio (Germanujo). Plie, Eurokka kaj mi mem atendas respondon de s-ano Soroka, el Svedio, pri la eblo, ke mi koncertus tiulande kaj surbendigus tie, en la unua studio por nur e-a muziko. Krome, en tiu ĉi jaro tute certe mi partoprenos en la UK en Valencio. Kiel mi diris antaŭe, mi nun muzikigas poemojn de M.Fernández kaj atendas aliajn de G.Neves kaj G.Kamaĉo. Fine, mi havas la celon prezenti kantaton surbaze de klasika muziko -sub la influo
de Bartok, Prokofief, Lutoslawsky, Messiaen kaj Falla-, nomatan "Muziko por la sep sferoj". Sed, bedaŭrinde, tio estas malfacila, ĉar mi devas trovi orkestron, rimedojn ktp. Nun mi nur revas pri ĝi. Espereble, mia muziko almenaŭ disvastigos e-on en rondoj de komencantoj kaj de homoj, kiuj ne konas nian lingvon, kaj, krome, aŭskultiĝos en niaj asocioj, grupoj, kongresoj, ktp, ĉu ne?

**Kajeroj**: *Sendube, jes. Kiom ni vidas, ja entuziasmo kaj diligento ne mankas al vi por tion atingi. Por atingi eĉ multon plian.*

*KAJEROJ deziras al vi plejan sukceson en ĉiuj viaj muzikaj entreprenoj kaj kore dankas vin pro la afableco, kiun vi montris respondante niajn demandojn.*

*Redaktoroj*


**MEMORU!**

**Abono "Kajeroj el la Sudo" . 800,-ptoj**

# La sefardoj



*Ni jam legis en la ĵurnaloj je la fino de marto pri la renkontiĝo inter la Reĝo Juan Carlos kaj la Prezidento de Israelo, Chaim Herzog, kaj la oficiala reamikiĝo inter la hispana nacio kaj la judoj, sed malgraŭ tiu reamikiĝo multaj detaloj pri la longa historio de la judoj en la lando, kie ili sin nomis sefardies (sefardoj), nome el Iberio, ne estas konataj nek bone klarigitaj en libroj pri hispana historio. Eĉ gravaj ĵurnaloj raportante la martan eventon donis konfuzajn detalojn, kiel, ekzemple, ke judoj unue alvenis la duoninsulon en la dua jarcento p.K.*

*Mia scivolemo pri la judoj sefardaj envenis, kiam mi, tiam loĝanta en Londono, unu tagon vagante tra la urbo vidis sinagogon kiu trafis miajn okulojn, ĉar legeblis sur la enirejo "Hispana-Portugala Sinagogo". Jarojn post tiu vidaĵo mi renkontis samideaninon kiu portis sur kolĉeno stelon de Davido, la judan emblemon. Post ne longa parolado ŝi diris al mi, ke ŝi estas sefarda, ke ŝia patro venis de Saloniko baldaŭ post la unua mondmilito, ke lia nomo, kaj ŝia antaŭ la edziniĝo, estis Lopes, kaj ankaŭ kiel ŝi ankoraŭ memoris iujn hispanajn vortojn diritajn de la patro. Tiel mi komencis serĉi informon pri tiuj judoj sefardaj kiuj parolis la hispanan, eĉ se iuj vortoj de ŝi diritaj sonis ne tre kastiliaj, laŭ nia nuna parolado. Kompreneble, mi kredis ke la plej bona loko por esplori pri ĉi tiu temo estus hispanaj fontoj en Hispanio. Kia eraro! Bonŝance al mi, la plej bonaj fontoj estis en Britio, en la universitato de la urbo kie mi nun loĝas. En ĝi troviĝas la "Kolekto Parkes" de libroj en pluraj lingvoj pri judaj temoj.*

*Oni ne scias, kiam la judoj unue venis en la duoninsulon, sed povas okazi ke ili sekvis la fenicajn komercistojn. Ni scias, tamen, ke relative granda nombro el ili venis en la*

*fenicajn koloniojn de la nuna Cádiz, Málaga kaj Cartagena, post ilia forpelo de Jeruzalemo far Nabukodonosoro II ĉirkaŭ la jaro 600 a.K. Oni scias ankaŭ, ke ili establiĝis iom post iom en grekaj urboj kiel Sagunto, Ampurias kaj Rosas. Sekve de la konkero de Jeruzalemo far Tito en la jaro 70 p.K. multaj el tiuj judoj etendiĝis tra la romia imperio, atingante Iberion kie jam loĝis samreligiuloj. Ŝajnas ke la iberiaj judoj ne ĉiam akordiĝis kun tiuj de Jeruzalemo, ĉar, laŭ dokumentoj de la unua jarcento, tamen ne publike montritaj ĝis 147 p.K., oni konstatas, ke rabenoj de Toledo petis informojn je la jaro 66 p.K. rilate al la mortigo de Jesuo. Malgraŭ ke de tempo al tempo okazis ediktoj kontraŭ la judoj, el kiuj la plej severa estas tiu de Adriano, ili prosperis kaj integriĝis al la vivo de la iberia Romo.*

*Kiam la visigotoj establiĝis en Iberio, la judoj bone prosperis, ĉar la novaj alvenintoj subtenis la arianan religion kontraŭante la katolikojn, ĝis Recaredo katolikiĝis en 586, tiam ili perdis la subtenon de la novaj kaj sekvantaj reĝoj. La historia tajdo ŝanĝiĝis kun la alveno de la berberoj, kiam la kristanoj sin kaŝis aŭ akiris la islaman religion. La judoj denove prosperis kaj tenis multajn urbojn sub sia kontrolo kaj administrado. Je tiu sama tempo la hebrea kulturo perdis influon en Damasko kaj Antioĥio pro la araba hegemonio; tiam rabenoj Mosseh kaj Hanock envenis Kordovon je 948 celante doni impeton al judaismo sub la tolero de Ab al-Rahman III. Je tiu tempo ankaŭ komencis kreski la kristanaj regnoj de Asturio, Navaro kaj Katalunio. De tiam ĝis la fino de la 15-a jc. oni vidas la apogeon de la kristanoj kaj la dekadencon de la muzulmanoj, dum la judoj, subtenante jen unu frakcion jen alian, sukcesis travivi la ŝanĝiĝantajn cirkonstancojn. En kelkaj urboj, kiel Gerono, Barcelono kaj Toledo, ili nombris eĉ duonon de la enloĝantoj, kaj atingis altajn rangojn kiel kuracistoj kaj instruistoj. La plej bone konata el ili estas la filozofo kaj kuracisto Maimonides, aŭ Mosen ben Maimon, kiu naskiĝis en Kordovo en 1135; ne longe antaŭ la fino de la jarcento la almoravidoj, fervoraj kaj striktaj islamanoj, malfaciligis liajn studojn kaj laborojn, tiom ke li devis forlasi Kordovon, unue, pro samaj motivoj Marokon kaj fine post mallonga restado en Palestino loĝis kaj forpasis en Egipto.*

*La judoj loĝantaj en Iberio jam de antaŭ longa tempo, eĉ antaŭ la periodo de la romanoj, ĉesis uzi la hebrean lingvon,*

*akiris la latinan, poste la araban, kaj fine la kastilian, ankoraŭ uzatan de la nunaj sefardoj, kiuj nomas ĝin ladino. Tiu ladino ne estas, baze, la nuna kastilia, sed tiu de la 14-a/15-a jc. Je la lastaj jaroj de la 15-a jc., komencis aperi en Kastilio pluraj neamikaj diraĵoj kontraŭ la sefardoj, el kio sekvis fine ilia forpelo la 30-an de marto 1492, laŭ ordono de la Katolikaj Gereĝoj. La judoj devis konverti sin al la katolika religio aŭ foriri el la lando. Multaj foriris laŭlonge de mediteraneaj regionoj, aliaj al Nord-Francio, Flandro kaj Anglio.*

*Ne eblas en ĉi tiu mallonga eseo doni pli longajn detalojn pri tiuj, kiuj foriris, nek pri la nombro de konvertitoj, aŭ "novaj kristanoj". Ni diru ke inter tiuj "novaj kristanoj" troviĝis Luis de Santangel, financa konsilanto de reĝino Izabela, Kristoforo Kolumbo kaj la fama poeto Gongoro.*

*Ne estis facile trovi en Hispanio librojn pri la historio de la sefardaj judoj. Ĉu la renkontiĝo inter la Reĝo de Hispanio kaj la Prezidento de Israelo je la fino de marto ankaŭ incitos la deziron por tiuj libroj? Inter la pluraj legindaj pri la temo, la plej detala kaj grava estas tiu de José Amador de los Rios, en tri volumoj, unue eldonita en 1848, sub la titolo "Historio politika, socia kaj religia de judoj en Hispanio kaj Portugalio", reeldonita antaŭ nelonge kaj tre utila pro la abundo de riĉa materialo.*

*Amador DIAZ*

*** *** ***

# Lingva angulo

Pagis sian respektivan ĉi-jaran abonon jenaj k-doj:

| | | |
|---|---|---|
| Amador Diaz Eleizalde | 1.000 | Ptojn |
| Enrique Piquero Vazquez | 1.000 | " |
| Mª Fernanda Onde | 1.000 | " |
| Ana Manero | 800 | " |
| Victor Ortiz Gratal | 800 | " |
| SUMAS | 4.600 | " |

NI TUTKORE DANKAS! FRUAJ PAGOJ MULTE HELPAS LA ADMINISTRADON!

## heredo


poetoj de l' paseo

vi maĉis ĉion
plumis ĉiel

nin herede
frustrojn kreajn
inkojn pigrajn
vakojn verkajn

nin kastris ĉi bunto
skema
tema

de vi heroldoj



*jam temp' está*
por rezigno
demisio
kaj ekfondo
nunparnasa

Salnevo

# La movado en kaj ekster Iberio




La 48-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos de la 9-a ĝis 13-a de aprilo 1993 en Hérouville St. Clair, apud Caen (Francio).Prelegos Jean Thierry en la kadro de dusemajna ekspozicio en la urba biblioteko. Ankaú oni lanĉos la Semajnon titolitan "Esperanto kaj Kino" per prelego-debato. Informoj kaj aliĝoj: Pierre Quillaud, 16, rue de Lieutenant-Vaisseau-Paris, 76120-Le Grand-Quevilly. Francio.

***** *** *****

Sabadell. De la 9-a de Oktobro-92 kaj dank' al la klopodoj de Kultura Asocio Esperantista -KAE- (asocio organizinta la lastan SAT-kongreson en Hispanio), komenciĝis la unua en Hispanio televida Esperanto-kurso. Ĝi konsistas el 12 lecionoj, kiujn gvidas Salvador Aragay ĉiuvendrede je la 23a horo. La sekvan tagon, matene kaj posttagmeze, oni ripetas la programon. Enkondukis la kurson José Mª Galofré, prezidanto de KAE, kaj la Urbestraro de Sabadell subvencias la Esperanto-kurson.

***** *** *****

"SENNACIECA REVUO PREMIITA". Kun ĝojo ni ricevis la novajon pri la premio aljuĝita al la SAT-gazeto "Sennacieca Revuo" de fondajo "Antonio Grabowski" pasintjare. La juĝkomisiono de la menciita fondajo prezidita de Ulrich Lins rekonas tiel la valorojn beletrajn, la altan nivelon kaj la gravan kontribuon de la revuo al la tutmonda kulturo, kiel la meritoplenan taskon de nia bona amiko Paul Signoret ekde la momento mem, kiam li prenis sur sin la respondecon de la redaktado de la revuo.

"Kajeroj el la Sudo" gratulas tutkore ĉiujn kunlaborantojn de la premiita revuo kaj speciale ties redaktoron Paul Signoret, kaj kuraĝigas la novan redaktorinon subteni la torĉon tiel alte kiel ĝis nun kaj, se eble, superi la ĝisnunajn atingojn!

*** *** ***

Zaragozo. Siatempe ni, hispanaj SAT-anoj, sciis pri la grava malsano de la prezidanto de SAT, k-do Yves Peyraut, kaj tutkore bedaúris pri lia sanstato. La Redaktoroj de "Kajeroj", same kiel la membroj de HALE, sin sentas feliĉaj sciante pri lia resaniĝo kaj reveno al la asociaj taskoj.

# Instruaj Rakontoj.

UNUECO ESTAS FORTO.

Estis foje patro, kiu volis instrui siajn filojn pri tio, ke nur vivante en bona harmonio, ili sukcesos kaj vivos feliĉe.

La filoj de la bonulo estis en akordo kiel peto kaj mordo, kaj fajfis pri la rekomendoj de la patro.

Tial, vesperon, la maljunulo alportis hejmen faskon da ligno, kaj petis ilin:

-Rompu tion.

La filoj klopodis sen limo per korpo kaj animo, sed ili ne povis disrompi la faskon.

Tiam, la patro malnodis la ŝnuron kiu kuntenis la branĉojn, kaj diris:

-Rompu nun branĉon post branĉo.

Kaj la filoj tion faris ege facile.

-Eble per ĉi ekzemplo vi komprenis kial mi petas de vi unuecon. Estante disaj, vi malfortos same kiel ĉi branĉoj, sed vivante en kompakta fasko frata, vi estos firmaj kaj fortaj.

Liven Dek

***　　***　　***

# Korespondi deziras.

D-ro Jorge Suardiaz Pareras, Hospitalo "Hermanos Ameijeiras" San Lázaro, 701. 10300 LA HABANA.(Cuba), dez. kor. kun kuracistoj pri literaturo, politiko, moroj kaj precipe pri klinika laboratorio, interŝanĝi profesiajn informojn kaj spertojn.

*****　　*****　　*****

Osmara Rivera Mancebo, calle G. Nr. 74, 2ª y 3ª, rpto. Sveno, Santiago de Cuba.

***　　***　　***

Junaj 10-14-aĝaj lernejanoj p.ĉ.t. Skribu al la instruistino Mª Luz Moya.Luna; Zamorana, 9 1/2 entre Aguilera y 1 Ra,Rpto: Zamorana, C-90300 Santiago de Cuba (Kubo).

***　　*****　　***

Idismir Mengana Terrero, Edif. 33-A, Apto.3, Micro 2, Apto.Abel Sta Maria, Santiago de Cuba (Kubo).

***　　*****　　***

Surelys Medina Rodriguez; Pio Rosado 308-A, Mirro y Maceo, San Lurs, Santiago de Cuba (Kubo).

***　　*****　　***

*Kajeroj — el la Sudo*

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str, Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.